



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
+36-1-2828885

Internacia sendependa gazeto pri la esperanto-movado 2 / novembro - '94

AGO-TAGO - INTERNACIE

En la antaŭaj numeroj aperis raportoj pri la ago-tagaj eventoj en Tuluzo kaj Zagrebo. Fine - dank' al I. Ertl - alvenis informoj ankaŭ pri aliaj landoj.

Francio: agado en pluraj urboj

En Francio en pluraj lokoj estis organizitaj ekspozicioj, budoj, staĝoj. Jen konciza resumo:

- Ĉe televido, mallonge antaŭe, aperis ĉe Canal Plus bonega elsendo pri Esperanto.

- En Boulogne-sur-Mer: prezento de Esperanto per videokasedo en la kastelo.

- En Toulouse: informado pri Esperanto sur la ĉefa placo (Vd. *Eventoj* 64).

- En v. Ranguieu: ekspozicio pri E-o, kun diversaj aktivaĵoj dum tuta posttagmezo - jen oni montris filmojn, diapozitivajn pri vojaĝo ĉirkaŭ la mondo dank' al Esperanto, jen oni rakontis fabelojn al infanoj (kun facilaj historioj), jen oni faris provlecionon de E-o. Granda sukceso - entute 131 homoj venis, - kaj du ĵurnalistoj.

Luksemburgio: Intervjuo en RTL

Unuan fojon Luksemburga Esperanto-Asocio partoprenis la Esperanto-Tagon.

Ĉar la celo estis paroli pri ni en la informperiodaĵoj, ni decidis organizi gazetaran konferencon en nia klubejo. Tiucele invito estis sendita al ĉiuj gazetoj, radioj, televido de la lando (ĉ. 40). Ĉefa rezulto estis, ke venis 3 raportistoj (plus invito por intervjuo ĉe radioelsendo en alia tago). En la plej disvastigata gazeto "Luxemburger Work" aperis tute favora artikolo pri Esperanto precize la 8-an de oktobro.

En la ĉefa radiostacio RTL kelkminuta intervjuo estis emanigata la 10-an de oktobro en la tagmezaj novaĵoj.

La rezultoj estis pozitivaj - jam venis petoj por lerni Esperanton.

laŭ C. Nourmont

Finnlando: informvideo

Esperanto-Societo en Turku aranĝis Ago-Tagon la 9-an de oktobro, samtempe

kun ĝia monatkunveno. La loko estis malnova urbodomo en la kultura centro de la urbo. Al loka gazetaro kaj radiostacioj la societo sendis informon fakte.

La kunveno komenciĝis per unua publika prezento de nova finlingva informvideo, farita de la societa laborgrupo. La video rakontis multflanke pri Esperanto kaj baziĝas parte sur materialoj de R. Dobrzynski.

Krome, la publiko vidis videon kaj diapozitivajn pri Infana E-Semajno en Kemiö, pri Nordia Forumo en Turku, pri la 79-a UK en Seulo.

Entute 23 personoj ĉeestis la kunvenon, el ili 4 komencantoj. Almenaŭ du lokaj radiostacioj menciis la aranĝon kaj unu el ili intervjuis la societatan prezidanton.

laŭ Tiina Oittinen, prez.

Argentino: ekspozicio

En la sidejo de la loka grupo "Esperanta Klubo de Venado Tuerto" omaĝe al la Rajto de la Internacia Komunikado, okazis inaŭguro de ekspozicio de revuoj, bultenoj kaj ĵurnalaj publikaĵoj naciaj kaj internaciaj en Esperanto;

Prezentado de video-kurso por hispanparolantoj, verkita kaj reĝisorita de Enrique Kohei.

Krome, estis planita por 22-a de oktobro en festa salono efektiviĝi "Festivalo de la kanzono en Esperanto", kun partopreno de 5 gekantistoj, interpretantaj nur popularajn kanzonojn tradukitajn en Esperanto. La festivalo estas la 15-a en Argentino.

laŭ Enrique Kohei, red. de Argentina Esp-o

Britio: Poŝtkartoj el 32 landoj

Por la ago-tago en la publika biblioteko de Filtron, Bristol estis preparita interesa propaganda ekspozicio el la poŝtkartoj, senditaj al brita esperantisto Frank Buckley. Enkadre de la ekspozicio estis prezentita lia nova traduko pri "Neĝulino", akompanita per ĵusfarita, digite registritaj muziko kaj kantoj.

Hungario: Reago de ministro kaj pluraj parlamentanoj


En Hungario la ĉi-jara ago-tago estis organizita de nova organiza teamo. La partoprenon en la surstrataĵoj "bojkotis" kaj

daŭrigo sur la p. 1.

Ĉu novaj aventuroj de Asteriks?

Ĉu vi aŭdis pri la mondfamaj historiaj herooj: la ruza Asteriks kaj lia fortega amiko Obeliks?

Plej verŝajne jes, ĉar Asteriks entuziasmigas ĉiujn generaciojn de legantoj en 42 landoj en tri kvaronoj de la mondo.



Pasis pli ol 20 jaroj post la apero de unua kaj ĝis nun la sola titolo de "Asteriks la gaŭlo", sed estas ankoraŭ multaj aliaj aventuroj de tiu konata heroo, kiu ĉiam batalas kontraŭ bildstriaĵ

romiaj legionaroj en plena serĉo kaj sprito kaj humoro.

Nun, la kroata eldonejo "Izvori" decidis eldoni plurajn titolojn de la serio, laŭplane eĉ 3 volumojn jare sur altkvalita papero, plastifigitaj kovrilpaĝoj, 48 belaj kvarkoloraj paĝoj, granda formato (29x17 cm).

La apero de la unua volumo "Asteriks, la gladiatoro" estas planita jam al decembro 1994! Pri la distribuado zorgos Kroata E-Unuiĝo.

M. B.

Helpu la projekton MAZI!

Okaze de la lastaj aktualaj informoj pri la stato de projekto MAZI, opiniante la projekton tre grava afero (propaganda ebleco), mi faras alvokon al tiuj gesamideanoj, kiuj ne volas dormi, nek esti singarda aŭ avara, sed estas pretaj agi kun spontanea aktiveco kiam ĝi necesas. Kaj nun necesas!

Gesamideanoj!

Ni senprokraste ekagu, ke la projekto MAZI efektiviĝu!

- Informiĝu, se vi ne estas ĝustmezure informita. Vidu la numerojn de *Eventoj* 48, 60-65 kaj *Esperanto*, oktobro/94.
- Preparu pri la temo nacilingvan informilon (informaĵon).
- Serĉu kaj vizitu la lokon, kie oni vendas, distribuas aŭ pruntedonas videokasedojn (libro- kaj videovendejoj, komercistoj, bibliotekoj ktp.!) Donu informojn,

daŭrigo sur la p. 2.



Popolnombro en Esperantujo (5)

Kvina artikolo. Malstatistikoj: fantaziado kaj mistifikado

Statistika fantaziado fare de Pierre Janton

En la unua franclingva eldono de sia libro *L'Esperanto* (1973, p. 112-113) Pierre Janton skribis, ke por la jaro 1972 estas eble taksi la aliĝintojn al diversaj esperantistaj organizaĵoj je proks. 50.000, sed oni povas nur hipotezi, kiam temas pri nombro de la ĉefa parto de la Esperanto-lingvokomunumo, kiu ne estas aliĝinta al organizaĵoj. Li informis, ke en 1960 popolnombro de donis probablecon de 300.000 ĝis 500.000 por la tutmonda esperantistaro, sed prisilentis la fonton de tiuj ciferoj. Dudek jarojn poste en la angla traduko de lia verko (*Esperanto*, 1993) okazis inflacio - aŭ ĉu temas pri demografia eksplodo? - ĉar Janton taksis je "almenaŭ 120.000" la membrojn el ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en 1987. Tiel, sen prezento de iu ajn objektivaj atestaĵoj, li duobligis aŭ triobligis la antaŭajn taksojn pri grupmembro de Dietterle, Dubin kaj CED, kaj ankaŭ sian propran ciferon de la jaro 1972. Ankaŭ en la verda cirklo estas ĵonglistoj, kiuj manipulas nombrojn.


Eĉ pli fantazia estas la aritmetika operacio, per kiu Janton kalkulis la nombron de esperantistoj en la mondo surbaze de la totalo de subskribintoj de la petskribo, favora al Esperanto, kiun UEA transdonis al Unuiĝintaj Nacioj en 1966. Estas kolektitaj 920.954 individuaj subskriboj krom tiuj de 3.843 organizaĵoj kies totala membreco estis iom pli ol 71 milionoj. Janton argumentis, ke se oni konsentas, ke dekonon (arbitra proporcio sen iu ajn reala bazo) de la 72 milionoj da intereso, rekte aŭ nerekte, pro tiu petskribo povas esti uzantoj de Esperanto, ilia nombro superos 7 milionojn. Sed eĉ se oni akceptas nur dudekonon aŭ kvardekonon (same kaprice elpensitaj frakcioj), la nombro restas ĉe 3,5 kaj proks. 2 milionoj respektive. Fine, Janton faris jenan konkludon: "Ŝajnas neverŝajne, ke en tiu vasta movado favora al Esperanto, nur tiel malforta proporcio de personoj (2,5 % = 1.800.000 homoj) estas kapablaj uzi la lingvon." Tio estas harstarige nekonsistenca konkludo, ĉar Janton misnomas la subskribintojn de la petskribo "tiu vasta movado, favora al Esperanto". Efektive, ne temas pri iuspeca organizita formo de movado, sed nur pri amaso da surpaperaj subskriboj, kiuj estis haveblaj po du groŝoj por cento! Pro tio, la statistikado de Janton estas ekzemplo de senrespondeca trukado, neniel meritanta seriozan konsideron.

La fantoma movado de Humphrey Tonkin.

La konkludoj pri kriterioj de lingva kompetenteco en la antaŭa artikolo por difini esperantiston evidentigas, ke estas necese postuli kiel minimuman kapablon la praktikan

uzadon de la lingvo. Sekvas, ke por la celo de popolnombro en Esperantujo ne estas inkludeblaj esperantanoj kaj ĉiuj aliaj specoj de apogantoj kaj simpatiantoj, kaj ankaŭ eks-esperantistoj; tiuj ĉi eble iam sciis la lingvon, sed poste forgesis multon kaj certe ne uzas ĝin. Same neenkalkulenda grupo konsistas el renegatoj aŭ apostatoj, kiuj forlasis la Esperanto-lingvokomunumon por apogi alian planlingvan projekton aŭ por definitive kabei. Tamen, kelkaj, pro diversaj kialoj, daŭre havas kontaktojn kun la Esperantomovado. Eble konvena etikedo por ili estas malesperantistoj.

Humphrey Tonkin, antaŭa prezidanto de UEA, elcerbigis koncepton por krei ankoraŭ unu kategorion, kiun li nomis la fantoma movado. Li difinis ĝin kiel la amasegon da pasivaj aŭ latentaj esperantistoj; alivorte ili estas potencialaj esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto. Laŭ aserto de Tonkin, tiu fantoma Esperanto-movado kelkfoje estas



pli granda ol la funkcia Esperanto-movado! Nu, oni ne devas esti profesia statistikisto por kompreni, ke taksado de fantomaĵo per nombroj estas pura kimero. Verdire, la koncepto de fantoma movado estas tute senutila elpensajo.

La mistifiko de la ĉinaj statistikantoj

Kvankam plurfoje estis emfazita la graveco de la kriterio de lingvo-kompetenteco por formuli senchavan difinon de esperantisto, enketantoj ĝis nun ne okupiĝis pri apartigo de esperantistoj en kategoriojn de lingvokapablo. Laŭ mia scio, estis publikigita nur unu statistika raporto pri landa movado, en kiu membronombroj estis aparte kalkulitaj surbaze de niveloj de lingvoscio kaj uzo. La artikolo pri statistiko en *Enciklopedio de Esperanto* (vol. 2, p. 503) citas la proksimuman "statistikon" publikigitan en *Kantona Esperanto-gazeto* en januaro 1934. La tieaj ĉinaj esperantistoj listigis la diversajn kapablojn kaj prezentis la nombrojn en kolumno A de la sekva tabelo.

	A	B
1. Adeptoj pli ol	300.000	987.000
2. Finis kurson pli ol	30.000	82.250
3. Skribas kaj parolas Esperante malpli ol	3.000	6.854
4. Korekte skribas kaj parolas malpli ol	300	571
5. Verkas aŭ tradukas malpli ol	30	48

En aliaj artikoloj pri statistiko en Esperantujo mi uzis tiun tabelon en identa formo, sed mi ne aldonis jenan klarigon, troviĝantan en *Enciklopedio de Esperanto*: "Oni povas multe konkludi el la suba proksimuma "sta-

tistiko" pri E. en Ĉinio, kvankam ĝi estas ĉefe nur imagita takso". Estas malfacile kredi, kiel kelkaj esperantistoj lasas sin trompi pro statistikaj donitaĵoj, celantaj pli imponi ol informi. Reago al mia publikigo de la tabelo venis de Donald Harlow, la redaktoro de la Esperanto-organo de la landa asocio en Usono, kiu, prikomentante la donitaĵojn, naive demandis, kiel okazis, ke la dividanto, uzata por diferencigi la diversajn kategoriojn, estas ĉiam precize 10. Nu, la respondo estas simpla: ĉinoj, same kiel ni, uzas la decimalan nombrosistemon. Sed ne venis en la kapon de Harlow, kaj plej verŝajne ankaŭ en la kapojn de aliaj legantoj de la supraĵe detala statistikado, la suspekto, ke temas pri mistifiko. Tiel la ĉinoj, per prezentado de nekutima bildo pri sia landa movado, sukcese blagis. Tamen, ilia statistika tabelo donas gravan instruon por ĉiuj estontaj popolnombro de esperantistoj: nur kvanta analizo laŭ kategorioj de lingvokapablo ebligas konvinkan kaj honestan respon-

donon de la demando pri la nombro de esperantistoj en la mondo, ĉar ĝi klare kaj

objektive montras, kiom granda estas la diferencoj inter esperantanoj kaj simpatiantoj (kategorio 1), esperantistoj kun praktika lingvoscio (kategorio 2), kaj la magra grupo de elituloj, kiuj primajstras la lingvon (kategorio 5).

Kolumno B montras kiel aspektas statistiko pri la tutmonda esperantistaro, klasifita laŭ la ĉina maniero. Por doni pli da ŝajna kredindeco kaj supozata aŭtenteco, mi uzis kiel totalon la ciferon 987.000, ĉerpitan el la tabelo en la artikolo de Stefan MacGill (IPR 4/1991), kaj mi elektis kiel dividanton ne 10, sed 12, la bazon de la duodecimala nombrosistemo. Tiel la rezulto estas iom malpli mistifika ol la ĉina nombro. Kion oni povas konkludi el ĝi pri reala situacio en Esperantujo?

Bernard Golden

HELPU AL MAZI!

laŭeble ankaŭ skribe, pri la projekto MAZI kaj proponu persone la antaŭmendojn.

- Same en via ĉirkaŭaĵo donu informojn pri la ebleco de antaŭmendo.
- *Via inform- kaj varb-agado estos multe pli efika, se vi prunteprenos la kopion de la unua parto de la filmo kaj prezentos ĝin.*
- Elpensu ankoraŭ pli efikajn manierojn kaj agoj!

Por la MAZI-projekto ni faru ne ago-tagon, sed ago-semajnojn! La sukceso dependas ankaŭ de Vi!

József Dudás, Hungario


Esperanto aplikata

Esperanta vortaro en Windows

Multaj demandas min lastatempe, kiam elektronika E-vortaro fine aperos. Do, ĝi alvenis kaj ĝi daŭre evoluas.

Vortaro 3.0 estis kreita kiel speciala servo en la ankoraŭ nefinita esperanta tekstoprilaboro programo, *Vortilo*. La programon mi lanĉis antaŭe, ĉar ĝi finpretiĝis antaŭ la ĉefa programo mem.

Vortaro funkcias surbaze de Windows 3.1, kun aldona disko por modifi Windows 3.0 al la nivelo de 3.1. Post simpla instalado, granda verda stelo bonvenigas la uzanton kaj gvidas ŝlin al la simplaj kaj bone organizitaj servoj *Superrigardo* kaj *Lernolibro*.



La kerno de la vortaro konsistas el vortareskaj paĝoj (unu vorto po unu paĝo), kiuj inkluzivas pli da informoj ol kutime: aldone al la difinoj sinonimoj, antonimoj, derivitaj kaj kunmetitaj formoj aperas sampaĝe. La plejparto de tiuj aldonaĵoj servas kiel pluirpunktoj al novaj paĝoj, do, la uzanto povas "foliumi" la vortaron pli libere kaj rapide ol kutimajn vortarojn.

Vortoj grupiĝas ankaŭ en specialaj vortgrupoj. De "Lando de bestoj" ĝis "Mezurunuoj" la uzanto trovas multajn grupojn de

interrilataj vortoj. Tiuj grupoj estas hierarkiaj: sub "Lando de bestoj" oni trovas subĉapitrojn de "Amfibioj" ĝis "Vermoj" - tiuj grupoj estas vere efikaj por lingvolernado, ja nia propra memoro ŝajnas esti simile grupoventita. Simpla trafolumado de tiuj listoj povas helpi en la lernado de la esperanta vortrezoro.

Tiu elektronika vortaro enhavas ĉirkaŭ 5.000 radikvortojn, 7.000 referencojn kaj 200 vortlistojn. Por ĉiuj Windows-uzantoj *Vortaro* estos bona aĉeto. Verŝajne la programo povus esti facile adaptebla ankaŭ al Macintosh komputiloj.

La pakajo enhavas kvar esperantigitajn litertipojn en True Type formato, kune kun la ebleco de estontaj aldonaĵoj, kaj en la programo, kaj en la litertipoj. Por uzi la programon Windows 3.0 aŭ posta, kune kun ĉ. 2.2 megabajtoj da libera harddiska kapacito estas bezonataj. Muso estas tre rekomendita.

La prezo estas nur 15.00 USD (plus 1.50 USD por la sendokoj). La aĉetantoj de *Vortaro* ricevos kvindolaran rabaton de la prezo de *Vortilo*.

Mark Thomas Arkey
112 Roxboro Cr#4, Mattydale
NY 13211-1112, USA
e-poŝto: mtarkey@aol.com
el *Esperanto-USA*, 2/1994

Rim: Atentu! Laŭ la priskribo ni opinias, ke la supra vortaro ne estas integrebla al subvindaĵaj tekstoprilaboraj programoj kiel WinWord aŭ WinWorks ktp, kiuj havas diverslingvajn sinonimajn kaj ortografi-kontrolajn vortarojn! "Vortaro" estas memstara programo! La red.

Verdula kunveno en Tampere

Mi, kiel sekretario nun denove subskribis kontrakton kun UEA, por ke AVE (Asocio de Verdaj Esperantistoj) restu en la UEA-jarlibro kaj havu eblecon renkontiĝi en kadre de UK-oj. Por la venontjara UEA-kongreso en Tampere mi jam mendis budon por ekspozicii kaj salonon por informi kaj diskuti (por 1 horo).

Mi esperas, ke ankaŭ kelkaj AVE-anoj estos tie. Krome mi esperas, ke ni povos informi kelkajn UEA-anojn pri AVE, VER-Dire kaj la ekologia politiko...

Ni havis informbudon en la Eŭropa konferenco de germanaj verduloj en Stuttgart. Multaj vidis nin, kaj parolis kun ni pri la ebleco de E-o en Eŭropa Unio. Iu juna sinjorino informis nin, ke ŝi partoprenis iun kunsidon de Eŭropa Parlamento en Strassbourg. En la apuda salono estis konferenco de TEJO, kaj ŝi aŭdis ilin preterside, tial ŝi iĝis scivola pri E-o. Ŝi partoprenos ankaŭ la IS-on en Tübingen en decembro.

Manfred Westermayer
Kandelstr. 62. D-79194 Gundelfingen
Germanio.
el *VERD-ire* n-ro 15

Dua "E"-stampo

Same kiel okazis en Chambéry dum tri monatoj, la urba centra poŝtoŝeĉejo (Centre de Tri Postal) en Perpignan, Francio uzos mekanikan longstampon, en Esperanto kaj en la franca.

La unua uzotago estos la 15-a decembro de 1994, naskiĝtago de Zamenhof. La subskribinto volonte peros la enpoŝtigon de kovertoj kaj poŝtkartoj en Perpignan, sufiĉe afrankitaj (francaj poŝtmarkoj aŭ IRK) kaj adresitaj al iu ajn.

Jean Amouroux,
1 rue de Sorède, F-66100 Perpignan, Francio

Komputila "Esperant"

Sub la nomo "Esperant" la germana entreprenado *Software AG* lanĉis grafikan programon, kiu celas solvi la malfacilaĵojn uzadi SQL. La programo baziĝas sur *Windows*.

el *"Espéranto Ile-de-France"*, nov/94

Pri Esperanto kaj la utilo

La landa ligo de GEA en Baden-Württemberg (BAVELO) aranĝis seminarion en Konstanz sub la titolo *Esperanto Nutzen*, kio signifas aŭ "utilo de Esperanto", aŭ "ĉerpi utilon el Esperanto". Dum la kvar tagoj de la 30-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro 1994 proksimume 60 homoj traktis plenan programon de prelegoj kun nur malmultaj distraĵoj.

Prave la organizantoj de BAVELO, ĉe la pinto Alois Eder, altiris al la seminario du organizaĵojn jam laborantajn pri Esperanto kaj utilo: TAKE (profesiaj konstruistoj ĉefe en Elzaco) montris, kiel esperantistoj povas meti sin en la neesperantistan mondon, kaj IKEF (ekonomikistoj) prezentis siajn laborojn. GEA-estrarano Heckhausen donis superrigardon pri la eblaj kampoj de utilpena laboro



(GEA-dokumento: "Strategio 2000"), kaj el tiuj prilumis apartajn kampojn du prelegoj: d-ro Blanke pri la lingvoscienco (kun aldono pri la Esperantofakvortoj) kaj d-ro Bormann pri la ŝancoj en turismo.

La programo de la konferenco estis dense plenigita. Estas laŭdinde, ke BAVELO eldonos libreton kun ĉiuj prelegtekstoj.

La limproksima situo de Konstanz tamen ne altiris najbarojn el Svisio kaj Aŭstrio, do la elekto de tiu multekosta urbo ne donis la ekstran avantaĝon deziratan. Por riverenci antaŭ la grava temo, kiun BAVELO volas plue pritrakti, ankaŭ la lokaj cirkonstancoj favoru plejble multnombrian partoprenon. Pensi pri utilo valoras la penon.

Werner Bormann

Rim: Ni planas baldaŭ aperigi parton de la prelego de R. Heckhausen. La red.

Kontaktoj serĉataj!

Esplora Centro de Ekonomia kaj Kultura Evoluado "Xua Xia" volas havi internacian kunlaboron kun komercistoj.

Kontaktu: Fang Miao-qing, Hua Xia Research Center of Economic & Cultural Development, No 62, Da Tang Xiang, Wu Lin Men, Hangzhou, CN-310005 Hejiang, Ĉinio.

Se iuj esperantistoj okupiĝas pri internacia negocado kaj estas interesataj kunlabori kun mi, bv. kontakti:

D-ro Boris Kolker, 1300 Superior Avenue,
Apt. 2109, Clevelend OH-44114, Usono.


Lignaj produktoj: partetlignaj tabuloj, rezino de pino (i.a. por fabrikado de kolofonio kaj terebinto), aktiva karbo. Komunaj investoj surbaze de nova leĝaro: Lic. Emilio Ridríguez Gómez, Mercado n 79, Apto. 24, ent.

Arroyo y Santa Maria, Centro Habana,
CU-10300 La Habana, Kubo.

Aranĝoj

Sarlando: Kultura semajnfino

La 44-an Kulturen Semajnfino organizas Sarlanda Esperanto-Ligo inter 09-11-an de decembro. En la programo: kunveno de aŭskultantoj de Pola Radio, ekskursoj, Kristnaskfestoj, magia vespero kun Trixini,



vizito de televido, aparta programo por infanoj k.a.

Oni trankvile en unu- kaj trilitaj ĉambroj. Plena pensio: 60 DEM por unu tago. Aliĝkoto: 30 DEM (gejunuloj ĝis 26 jaroj ne pagas).

Aliĝo, plia informo ĉe:

Sarlanda E-Ligo, Quierstr. 11,
D-66287 Quierschied, Germanio
Tel.: +49-6897-62142

Himalaja Renkontiĝo

La nepala Esperanto-Asocio anoncas 12-tagan renkontiĝon (26. februaro - 09. marto '95) organizatan por konigi sian landon al ali-landaj esperantistoj. Apenaŭ ekzistas iu lando en la mondo, kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate al natura, etna kaj kultura diverseco. Partoprenante la renkontiĝon, vi havos la ŝancon formi vian propran bildon de la lando kaj samtempe konatiĝi kun la lokaj esperantistoj. Vi pasigos la unuajn kaj lastajn tagojn de la renkontiĝo en la Kathmandu-valo, la ĉefa urba centro de Nepalo.



La ĉefparto de la renkontiĝo estos vojaĝo al alia granda valo de Nepalo, Pokhara, situanta okcidente je 200 kilometroj de Kathmandu. Survoje vi haltos por fari rajdon flose sur la rivero Trishuli. De Pokhara vi faros tritagan rondpiedvagadon al Sarangkot (3 km), dum kio vi havigos al vi, krom eble kelkajn dolorantajn muskolojn ankaŭ bonan ideon pri la tiea vilaĝa vivo. En Kathmandu vi loĝos en bonkvalita hotelo. Kontakto:

Sierra Travel, PO Box 3565,
Kathmandu, Nepal

IFEF-kongreso en Hungario

La 47-a kongreso de Internacia Fervojsita Esperanto-Federacio, IFEF okazos inter la 20-a kaj 26-a de majo 1995 en urbo Pécs, Hungario. Plia informo, aliĝoj ĉe:

IFEF-LKK,
Pf. 7, H-1378 Budapest, Hungario

Komputilo kaj Esperanto

Dum la IF (27 dec. - 3 jan., Germanio), la "Novjara aranĝo por junaj familioj kaj esperantistoj de meza generacio", okazos multaj prelegoj kaj distraj programoj. Jen ankoraŭ kelkaj el ili rilate al la kadra temo "Komputilo kaj Esperanto":

- Sándor Hideg: "Bazaj esperantaj terminoj por komputil-aplikantoj"
- Anton Oberndorfer: Kiel adapti karakterojn por havi esperantaj literoj (en DOS kaj Windows)"
- Harald Schicke: "Libroproduktado per komputilo"
- Hermann Tautorat: "Aŭtomata traduko"

kaj multaj aliaj prelegoj. Detaloj kaj aliĝo ĉe:


Hans-Dieter Platz,
Pf. 1148, D-34303 Niedenstein, Germanio.
Fakso: +49-5624-322.

Ne forgesu, ke vi povas utiligi nian donackuponon! La red.

IKUE- kaj KELI-kongresoj

En 1995 okazos du IKUE-kongresoj.

1. La 48-a Kongreso de IKUE okazos de 15.7.1995 en Ĉeĥio, verŝajne en Olomouc. Celo estas solvi la nunajn problemojn de IKUE, sed ankaŭ subteni la stabiligon de IKUE en la ekssocialismaj landoj, precipe en Ĉeĥio.



Plia informo ĉe la prezidanto de la LKK:

s-ro Miloslav Szacek,
Trsicka 6, CZ-75127 Pencil, Ĉeĥio.

2. La 49-a Kongreso de IKUE okazos kune kun KELI kiel 11-a Ekumena Kongreso. Do, la 11-a Ekumena Kongreso, samtempe la 49-a de IKUE kaj 45-a de KELI, okazos 31.07. - 07.08.95 en Kaunas, Litovio.

Celo estas la fortikigo de la ekumenaj streboj inter la esperantistoj kaj la subteno de la kristanaj esperantistoj en Litovio kaj la aliaj ĉebaltaj landoj.

Plia informo ĉe la prezidanto de LKK

Erikas Laikonas,
p/k 165, LV-3000 Kaunas, Litovio.

Bonvenon al Belorusio!

Por ĉiu vizitanto ni pretas organizi unutan kulturen programon! Ekskurso tra la urbo Grodno (Domo de L. Zamenhof, muzeo, katolikaj kaj ortodoksaj preĝejoj, antikvaj kasteloj ktp). Kosto: 3-foja manĝado, noktumado, ekskurso: 11 USD. Kontaktadreso:

Sergej Surba, str. 40 hod Peramohi 6-2,
230026 Grodno, Belorusio.
Tel.: +7-017-66980

Konkurso

Literatura konkurso - por virinoj

1. La "Premio Clelia Conterno" estas iniciato de LF-koop, honore al Clelia Conterno Guglielminetti (1915-1984), membro de literatura rondo *La Patrolo*, por stimuli la beletran verkemon de virinoj sine de la Esperanto-komunumo.

La partopreno estas senpaga, kaj rezervita nur al virinoj.

2. La konkurso havas tri branĉojn:

- poemoj;

- noveloj;

- recenzoj (pri beletra libro originale verkita en Esperanto, aperinta post 1992).

Ĉiu konkursaĵo devas esti originale verkita en Esperanto, kaj neniam publikigita. La verkistinoj rajtas konkursi en ĉiu branĉo, per maksimume po tri tekstoj.



3. La poemoj devas ampleksi minimume 14, maksimume 100 versojn.

La novelo devas ampleksi minimume tri paĝojn, formato A/4, je interlinio 2, po 34 linioj, po 60 klavtuŝoj (karakteroj). Maksimume ĝi ampleksu 123 paĝojn, kun samaj kondiĉoj.

Por la recenzo validas la samaj postuloj kiel por la novelo.

4. Ses kopioj de ĉiu tajpita teksto iru al la sekretariino de la Premio:

F-ino Catherine Samain
30 Place des Tries
F-08320 Vireux-Wallerand (Francio).

La sendaĵo estu prefere registrita. Oni malakceptos netajpitajn tekstojn. Ĉiu teksto havu titolon, kun indiko pri la pseŭdonimo de la aŭtorino.

5. La verkistinoj havas tempon ĝis 31.03.1995. por sendi sia(j)n konkursaĵo(j)n.

6. Kvinopa juĝkomisiono, konsistanta nur el virinoj, asignos la premion por la respektivaj branĉoj.

7. La konkluda ceremonio okazos en Gdansk (Polio), dum la 14-a Internacia Literatura Forumo (15-19.07.1995.) La premiitaj tekstoj aperos premiere en *Literatura Foiro*. Krome, ĉiu premiito ricevos krediton de 200 svisaj frankoj, validan por la aĉeto de varoj ĉe LF-koop.

8. La eldonrajto de la premiitaj tekstoj apartenas al LF-koop.

9. La partopreno en la konkurso implicas la senkondiĉan akcepton de ĉi tiu regularo.
el *Literatura Foiro* n-ro 151/1994
mallongigite

Movado

Malfermita pordo en Vieno: mil vizitantoj

Ĉiu-jare la 26-an de oktobro - ĝi estas la aŭstria nacia festotago - la vienaj muzeoj estas senkoste viziteblaj. Tion oni nomas tago de "Malfermita Pordo". Ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo - kvankam ĝi estas ĉiam senkoste vizitebla - ĉi jare bonvenigis per speciala programo siajn gastojn. Estas ĝojige, ke speciale multaj ĉeĥoj, hungaroj kaj slovakoj montris grandan intereson kaj amase trovis la vojon al la Esperanto-Muzeo: venis entute mil personoj. Ĉiuj vizitantoj ricevis informojn pri Esperanto en sia nacia lingvo, ili povis aŭskulti muzik-kasedojn, spekti videokasedojn kaj ricevi provlecionon. Pro la granda sukceso oni tute certe ankaŭ en la venonta jaro ofertas similan programon.

Herbert Mayer, dir. de IEM
ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko

Ĉu du laborbrigadoj en Italio?

La estraro de IEJ (Itala E-Junularo) traktis la preparojn de du someraj laborbrigadoj. Unu el ili estus organizota de Guido Carravieri, prez. de IEJ, kaj ankaŭ la torinanoj ŝatus ripeti la ĉi-jaran sukceson.



Eventualaj interesiĝantoj indiku sian interesiĝon al IEJ:

p/a G. Carravieri,
via Porpora 140/17, I-20131 Milano, Italio.
el ItInfo sept./94

Ago-tago en Budapeŝto

daŭrigo de sur la paĝo 1.

HEA- kaj HEJ-estraro (ĉeestis nur la prez. de HEA), ĝi estis maldigna ankaŭ por aliaj budapeŝtanoj, do la publikan agadon partoprenis nur ĉ. 40 personoj. En la fina kunveno estis akceptita alvoko, direktita al Ministerio pri eksterlandaj aferoj, kio estis dissendita al multaj ŝtataj instancoj.

Pri la tagaj eventoj raportis pluraj landaj kaj ĉefurbaj gazetoj, estis radiointervjuita d-rino Ilona Koutny, - kaj pro la kampanjo esperantistoj estis invitataj resp. menciitaj en pluraj postaj TV-elsendoj. La ago-tagon partoprenis ankaŭ la TV-teamo de vesperaj novaĵoj (unu el la plej rigardataj programoj), sed pro la mizera nombro de ĉeestantoj la 3-minuta registraĵo fine ne estis elsendita...

Al la dissendita alvoko reagis pluraj parlamentanoj (preskaŭ ĉiu pozitive), inter ili ankaŭ la ministro pri edukado...

- x -

Rim. Al la evento eble ni revenos en iu posta numero. La red.

Unuĝintaj Asocioj

- Precize meznokte, inter la 23-a kaj 24-a de septembro 94, meze en la arbaro apud Eلسپت naskiĝis

Esperanto Nederland'!

Malgraŭ la fakto, ke samtempe mortis la gepatroj NEA kaj FLE (la ĝisnunaj 2 landaj E-asocioj) granda kvanto de ĉeestantaj esperantistoj bonvenigis la novnaskiton per ĉampana tosto.

P.S. 156 personoj (inter kiuj ankaŭ kelkaj el eksterlando) travivis kelkajn agrablajn tagojn ĉe la lulilo de la nova nederlanda E-unuigo.

espero@saluton.xs4all.nl

REU + REA = REU

Ankaŭ en Rusio unuigis la fortoj: Dum la komuna novembro kongreso la ĝisnunaj 2 landaj E-asocioj de Rusio decidis


- ekde la 5-a de novembro 1994 daŭrigi sian agadon kadre de unuigita landa asocio;
- provizore uzi por la asocio la statuton de REU;
- alvoki ĉiujn esperantistojn kaj e-kolektivajn aktive partopreni en la laboro de la unuigita asocio.

Prezidanto de la malnove-nova asocio iĝis Nikolao Gudskov!

Rim.: N. Gudskov estis nia kunredaktoro, stangante ĉe EVENTOJ inter januaro 93 kaj julio '94. Gratulon al Vi, Nikolaj, kaj multajn sukcesojn! La red.

Novaj el Venezuelo

* En oktobro komenciĝis la unua kurso de Esperanto en la Lernejo de Filozofio de la Fakultato de Humanismaj kaj Edukaj Studoj de la Centra Universitato de Venezuelo en Karakas. La kurso estas nedeviga, sed la kursfinontoj rajtas gajni du kreditojn, same kiel la kursanoj de la latina aŭ la greka lingvoj. La kursgvidanto estas profesoro Johano Negrete.



de ĝiaj fakartikoloj. En la Homeopatmedicina Lernejo de Karakas Esperanto estas deviga studobjekto.

* La Jara Asembleo de la Venezuelana Esperanto-Asocio okazis la 19-an de novembro en Karakas.

* La ĉijara Zamenhof-Festo okazos kun bankedo la 2-an de decembro de 1994, kiel en antaŭaj jaroj, en domo de Maria kaj Johano Bachrich.

* Profesoro Fernando de Diego ĉi-monate finos la unuan fazon de sia laboro en la Granda Hispan-Esperanta Vortaro. La juna kaj fama hispana verkisto Antonio Valen helpos De Diego kun la vortaro.

J. E. Bachrich,
apartado 70782, Caracas 1071 A, Venezuelo

Ŝparu 82 guldenojn ĉe MAZI!

La preparoj de la profesinivela videokurso "MAZI en Gondolando" bone progresas. Momente ni havas 370 antaŭmendojn, sed - danke ankaŭ al via insista informa laboro - daŭre venas novaj.


Tamen jam tre proksimas la limdato, kiam ni devas decidi ĉu jes aŭ ne ni komencu la produktadon, kaj ni devas havi financajn garantiojn. Ni atendas respondon ankaŭ de iu ne-esperantista instanco pri financa apogo.

Bonvolu nepre averti la legantojn, ke oni pagu la antaŭmendon en sumo de 98 guldenoj (ne plu validas 50 USD).

Post la fermo de kolekto de antaŭmendoj

la reala vendoprezio por unu kompleto de MAZI estos 180 guldenoj. Do, mi pensas, ke la ŝparo de tiuj 82 guldenoj vere estas instiga, ja verŝajne nun aŭ poste tamen ĉiuj societoj kaj seriozaj instruistoj volos havi la kasedon.

Mila v.d. Horst-Kolinska



Rim. 1.: Por antaŭmendi la kasedon vi sendu 98 gld al la UEA-konto: IEIN-Q, kaj leteru al Internacia E-Instituto (Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando) informante krom via precizaj nomo kaj adreso ankaŭ pri la dezirata videosistemo: VHS-PAL aŭ NTSC.

Rim. 2.: Hungaroj povas pagi al la red. de EVENTOJ (aktuala egalvaloro de 98 gld, nune: 6700 Ft, por instancoj aldoniĝas 25 % de AVI). Poloj povas pagi al s-ino Diodora Kolinska, ul. Szymonowica 8, PL-71482 Szczecin.

ANONCTARIFOJ

Tarifo por unukolumna kadrita anonco kun 3 cm-oj de alto estas 30 NLG, por eksoclandanoj: rabato 66% (por hungaroj 550 HUF); 1 cm²: 1,66 NLG (resp. 0,55 NLG, 30 HUF).

Movad- kaj privattemaj anoncoj de abonantoj, deziroj korespondi ks. ĝis 20 vortoj aperas senpage, tamen pro eventula manko de loko la

redakcio ne garantias ilian tujan aperon.

Samtema anonc(et)o povas aperi senpage nur unufoje.

Tarifo por komercaj anoncoj, nehavantaj rilaton al esperanto, estas duobla!

Pago de anoncoj: al la redakcia adreso (pk. 87, H-1675 Budapeŝto) aŭ al la UEA-kodo: ELLS-S. La anonco aperas post la ricevo de ĝia pago.

Karcero pro esperantaĵoj

Irana esperantistino, loĝanta en Turkio, rakontas pri okazaĵo en la postrevolucia Irano. Post tiam la aferoj jam ŝanĝiĝis. Ne ĉiuj el ni loĝas en trankvilaj partoj de la mondo.

Eble la suferado de popoloj, loĝantaj en militaj landoj al vi aspektas kiel filmo, sed en la homoj, vivantaj en tiaj landoj, restas profundaj spuroj ĝis la fino de la vivo. Mi rakontos al vi travivaĵojn, okazintan milittempe al unusola internacia esperantista familio en Irano.

La dato profunde restis en mia memoro ankaŭ pro la jubilea jaro 1987, ĉar ni anticipis planis partopreni en la Universala Kongreso en Varsovio. La vintro estis severa, sed proksimis la irana novjaro, festo, kiu komencas la printempon. Pro tiu festo mi anticipis vojaĝis al Irano. Intertempe ofte estis bombardadoj. Pro ili aviadiloj aŭ ne povis flugi aŭ mankis loko pro la tumulto. Tial du tagojn antaŭ la festo mia edzo Enver Yalĉin, turka esperantisto, telefone kontaktis min kaj diris, ke sekvatage li vojaĝos al Irano por helpi min reveni al Turkio buse.


Pasis unu tago, du tagoj, kaj la trian kaj kvaran mi jam malpacienis kaj telefone demandis pri la afero nian amikon en Istanbul. Li diris, ke Yalĉin ekveturis al Irano antaŭ kvar tagoj. Ho, kion fari? Mi telefonis al trafikpolico kaj al malsanulejo, sed ili nenion sciis, ankaŭ dum kvar tagoj sur la vojo ne okazis akcidento.

Do, kie li povis esti? Telefone mi ne sukcesis ekscii, ĉu li transiris la limon, tial mia bofrato konsentis vojaĝi al la landlimo mil kilometrojn for de Tehrano, spite la multan neĝon. Post esplorado ĉe la transirejo evidentiĝis, ke li transiris la limon antaŭ tri tagoj. Do kie oni povus serĉi lin?

Finfine spuro

Post semajno sincera voĉo pertelefone sciigis, ke mia edzo estas arestita. Mi demandis, de kie la persono konas lin?

- Ankaŭ mi estis arestita kaj konatiĝis kun li en la sama karcero. Vi helpu lin, ĉar li estas tute senkulpa.



La afablaj kaj sinceraj vortoj de tiu irana junulo iom trankviligis min, kaj mi dankis lin.

Denove mia bofrato vojaĝis al la nomita loko, kiu troviĝas okcent kilometrojn for de Tehrano, esperante kontakti kun mia edzo. Bedaŭrinde estis vana espero, ĉar oni dum tuta semajno ne permesis al ni renkontiĝi.

Pasis du semajnoj, kaj post multe da demandado mi eksciis, ke la problemoj rilate al arestoj de eksterlandanoj apartenas al speciala altkortuma instanco. Mi skribis peton, klarigante la tutan aferon, kaj oni promesis renkonti min en la sekva tago. Tiam mi iom ekesperis, ĉar antaŭe mi pensis, ke pro la transiro de ŝaha al islama regado kaj pro la milito ne eblus tuj ordigi ĉion.

Sekvatage mi iris al la renkontiĝo. De la pordego post ĝishaŭta kontrolo oni kondukis min al granda salono. La ĉefo estis tre ĝentila viro kun mallonga barbo kaj sen turbano. Li atente legis la leteron kaj telefone parolis kun la respondeculo de la karcero. Poste li diris al mi, ke mi povos renkonti mian edzon kaj atendi ĝis oni juĝos lin.

- Se oni ne permesos al vi renkonti la edzon, petu, ke la estro telefonu al mi.

Kun la bofrato ni veturis al la karcero, survoje estis multe da neĝo, sed fine post longdaŭra veturado ni atingis la lokon. Estis granda vico de homoj, kiuj atendis la respondon pri arestitaj parencoj de militrifugiintoj.

Aresto pro fotoj kaj esperantaĵoj

Post longa atendado gardisto diris, ke nur viroj rajtas eniri. Ho, kiaj malfacilaĵoj! La bofrato iris supren kaj memorigis al la ĉefo pri la telefonvoko el Tehrano. Tiam la ĉefo permesis, ke mi iru supren. Kiam li renkontis min, li ĝuste kolere vokis oficistojn kaj postulis la dosieron de Jalĉin. Ili serĉis kaj nenion trovis. Li volis forpuŝi la aferon, sed mi transdonis la mesaĝon de lia ĉefo. Kolera, li devigite telefonis al sia ĉefo. El tiu interparolo mi komprenis, ke la kaŭzo de la aresto rilatis al esperantaĵoj, kasedoj, fotoj. Ĉiukaze post la telefonparolo li donis la adreson de la karcero. Kiam ni atingis tien, juna gardisto diris, ke antaŭ momento oni translokigis lin al alia urbo. Tiam mi komencis kolere paroli, sed tiu afabla gardisto diris al mi: - Mi aŭdis, ke vi estas instruistino, kaj mi estas kiel via lernanto. Se vi deziras helpi vian edzon kaj ke oni ne arestu ankaŭ vin, akceptu mian konsilon: vi povas

solvi la problemon en Tehrano.

Aŭskultinte lin, ni reveturis al Tehrano kaj denove renkontis la ĉefon kaj rakontis ĉion al li.

"Ne parolu esperante!"

Ĉi-foje li donis al mi stampitan leteron, por ke mi transdonu al la ĉefo tie. Ni denove veturis kaj feliĉe la letero efikis, finfine ni iris al la arestejo. Post iom da tempo mi vidis, ke alroksimiĝas iu armea ĝipo. Kiam ĝi atingis nin, mi vidis soldaton kun iu viro, kiun mi unue ne rekons kiel mian edzon, pro lia longa barbo kaj maldika korpo. Aŭdante lian voĉon, mi komencis plori, kaj demandis esperante:

- Kion vi faris?

Li respondis nenion.

- Kiam do vi liberiĝos?

- Iun tagon, - li diris.

La soldatoj avertis, ke ni ne parolu fremdlingve, kvankam mia bofrato diris al ili, ke nia komuna lingvo estas Esperanto kaj ke ni ankoraŭ ne bone komprenas la lingvon unu de la alia. Sed ne utilis, kaj ni post momento disigiĝis. Ambaŭ soldatoj estis ege kortuŝitaj de la tragedia sceno.

Trompa ĉantaĝo

Intertempe, dum ni estis for, venis iu viro per aŭto, eniris la korton, prenis turbanon el sia teko kaj surmetis ĝin. Poste li diris al mia fratino, ke li estas el la sekreta polico, kaj povas savi mian edzon, se mi donos certan sumon. Li lasis sian adreson, kaj post multe da esploro ni konstatis, ke li estas falsulo, kiu pensis, ke li povos trompi nin tiamaniere.

Finfine post kvindek naŭ tagoj kun multegaj klopodoj mia edzo liberiĝis sen ricevi la kasedon kun esperantaj kantoj. Li ankaŭ ne ricevis siajn fotojn aŭ la gazetojn, inter kiuj estis unu turka turisma periodaĵo. En ĝi estis marborda pejzaĝo kun banvestitaj virinoj, kiun ili traktis kiel pornografiaĵon.

Tamen per la helpo de bonkora bankestro ni sukcesis ricevi la monon, kiu estis prenit de li sen iu ajn kvitanco.

La malagrablaj travivaĵoj, kiujn li spertis dum du monatoj en fremdlanda arestejo estas tute aparta, longa kaj kortuŝa historio.

Heshmat Yalĉin

el TEJO Tutmonde, okt-dec/94

Ni atentigas, ke temas pri aresto okazinta en 1987, dum milito. Publikigante la artikolon de s-ino Yalĉin, ni ne volas esprimi ajnan politikan starpunkton. Pri similaj okazaĵoj en la lasta tempo ni ne aŭdis. La red.

Alvoko!

Helpu al ruandano!

Ekde kelkaj monatoj Edmond Uzziel, 27-jara, troviĝas kiel azilpetanto en Germanio.

Dum lia fuĝo el Ruando helpis al li ger-

mana esperantisto Peter Rudolf. Li havas 59 jarojn, flue parolas la francan, anglan kaj sendube - la germanan.

Peter vivis en la jaro 1988 kaj '89 en la proksimejo de Rostock (Germanio), ĝis li en la jaro 1990 veturis al Edmond en Ruandon.

Por akceptiĝo de Edmond kiel fuĝinto kontakto kun Peter Rudolf respektive lia ad-

reso tre helpus.

Se vi estas Peter aŭ vi konas/is lin, bv. skribi al unu de jenaj adresoj:

1. Edmond Uzziel, Drossenfelderstraße 2, D-95445 Bayreuth, Germanio.
2. Anwaltsbüro Meyer-Heim, advokato, Sulzbacher Str. 85, D-90489 Nürnberg, Germanio.

Lingvo

Kio estas mia nomo?

La problemo estas pli komplika ol ĝi povus aspekti unuapense. Ĉar efektive eblas pluraj manieroj esperantigi la proprajn nomojn, sed niaj verkistoj ĝis nun ne akordiĝis, kiun el la eblaj kriterioj apliki, tial ekzistas granda konfuzo. Fakte reguloj estas almenaŭ tri. Unu konsistas el la simpla aplikado de la esperanta alfabeto (q=k, y=i, x=ks ktp.). Sherdahelyi nomis tiun procedon "grafika nivelo". (Ekz. Nev Jork). Alia sistemo (rekomendita de Zamenhof, "fonetika nivelo") estas klopodi reprezenti la originalajn sonojn pere de la esperantaj literoj (ekz. Nju Jork(o). Alia ebleco ("semantika nivelo", ofte sed ne regule aplikata en "Leksaro" de la paro Ŝulco-Bermano) estas traduki esperanten la originalan signifon (ekz. Nova Jorko). Tial, ekzemple, la fremdaj nomoj *Neukirch*, *Vättersee*, *Saint Jean*, *Newfoundland*, *Castellon*, *James* povas fariĝi respektive (grafike) *Neukirho*, *Vaterseo*, *Saintjeano*, *Nev-foundlando*, *Kastelono*, *Jameso*; aŭ (fonetike) *Nojkir(o)*, *Feterse(o)*, *Sentjan(o)*, *Njufoundland(o)*, *Kasteljon(o)*, *Ĝejms(o)*; aŭ (semantike) *Novkirko* (aŭ *Nova Preĝejo*), *Veterlago*, *Sankta Johano*, *Nova Tero*, *Kastelego*, *Jakobo*. Mi ne komprenis, ekzemple, kial, laŭ *Ŝulco-Bermano*, la francaj nomoj *Jacques* kaj *Jacqueline* fariĝis *Jakobo* kaj *Jakvino*!!!

Laŭ la supraj principoj, mia nomo povas transkribiĝi, laŭ la gustoj, de *Georgo*, de *Ĝorĝi*, de *Ĝorĝio*, de la *Georgoj*. Ne, dankon!

Iam cirkulis en niaj rondoj anekdoto pri okazaĵo en internacia kongreso, kie pluraj kongresanoj malkovris, ke ili ĉiuj venis el sama urbo: *Novkastelo*. Nur post klarigoj evidentiĝis, ke ili venis respektive el *Châteauneuf* (Francio), *Neuchâtel* (Svisio), *Newcastle*

(Britio), *Neuburg* (Germanio), *Castelnuovo* (Italio), *Castelnuevo* (Hispanio) k.s.

...Ĝenerale oni ripetadas la refrenon, ke la legantoj devas scii, kiel prononciĝas la legatataj nomoj. Aparte de tio, ke mi min demandas, kiu kutimas legi librojn aŭ gazetojn laŭtvoĉe, al ĉiu povas ĉiutage okazi, legi fremdajn nomojn, kies prononcmankas estas konata nek al la leganto, nek al la verkinto. Ja estas al mi sunklare evidente, ke neniu verkisto en la mondo konas la prononcregulojn de la pli ol 4.000 lingvoj parolataj sur la tero. Ekzemple: ni, italoj, skribas *Mao Tse Tung*, la esperantistoj *Mao Ze Dong*. Kiu scias la ekzaktan elparolon? Cetere la esperanta alfabeto ebligas esprimi 26 fonemojn, dum tiuj ekzistantaj en la mondaj lingvoj estas kelkaj centoj.



Do, jen kial mi skribis, ke temas pri nesolvebla problemo, tial *neproblemo*. Tiom, ke konsilindas rezigni.

Fakte la naciaj lingvoj jam delonge rezignis sialingvigi la fremdajn proprajn nomojn kaj ilin skribas laŭ la originala formo, kaj nur, se aliaj alfabetoj, oni latinalfabetigas ilin. Delonge finiĝis la tempoj, kiam la skota kondotiero *John Lockwood* fariĝis ĉe ni *Giovanni l'Acuto*, aŭ *Descartes Cartesio*, *Komenski Comenio*, *Bacon Bacono*, ktp. Se ĉiuj naciaj lingvoj

pretendus ekscii unualege la ĝustan elparolon de la fremdaj nomoj, la francoj devus skribi mian nomon *des Djordji* kaj la angloj *da Georgee*!!! Senkomente.

Sed ofte esperantistoj volas esti pli papistoj, ol la Papo! ... Kaj ĉiu estu libera aliformigi sian nomon ĝis nerekonlebleco: *Corsetti* ja rajtas subskribi kiel *Korseti* kaj *Casini* diri, ke li loĝas en legomo (*Pizo*), sed mi apelacias, ke oni ne masakru la mian, kiu estas denaske kaj devas resti

Aldo de' Giorgi.
el l'esperanto, n. 6/1994.

I L E I

Instrui instruistojn

La Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto (NGGE), landa sekcio de ILEI, organizas porinstruistan seminarion,



kiu okazos de la 17-a ĝis la 19-a de februaro 1995 en la naturamika domo "Eikhold" en Heerlen en la sudo de la nederlanda provinco Limburgo.

Ĝi estas organizata interkonsente kun ILEI-sekcioj de Belgio, Britio kaj Germanio.

La temo de la seminario estos *La prope-deŭtika valoro de Esperanto* kaj ĝin enkondukos du invititaj konataj spertuloj.

La partoprenkotizo, 150 NLG, inkluzivas kompletan restadon en 2-personaj ĉambroj kaj manĝadon.

Interesitoj bv. anonci sin antaŭ la 1-a de decembro ĉe la sekretario de NGGE:

Hans Ten Haagen, Middenweg 587,
NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando.
Tel.: +31-2207-17918

Juna movado, junaj instruistoj...

14-jara knabo gvidas kursojn en Albanio, sed li bezonas instruilojn. La adreso por helpemuloj:

A. Doçi, Rrenz,
Fushë Cidhen, Peshkopi, Albanio.

Esperanto en radio

Novaj frekvencoj ĉe Pola radio!

Estimataj,

mi eluzas la eblecon de rapida aperritmo de *Eventoj*, kaj petas informi ĉiujn esperantistojn pri la novaj ondolongoj, kiuj funkcios de la 1-a de decembro 1994 (!!!). Ni plue konservas du elsendojn tage, eĉ je la samaj horoj, sed sen la mezonda frekvenco (neniu redakcio ricevis tion. Oni rezignis pri ĝi pro la kaskadiginta aparataro kaj altaj uzo-kostoj). Estas ŝanĝitaj kelkaj frekvencoj, jen la aktualaj:

- 15.30-15.50: 9525 kHz (31.5 m), 7285 kHz (41.18 m), 7145 kHz (41.99 m), 6135 kHz (48.9 m) + satelito
- 22.30-22.55: 6135 kHz (48.9 m) kaj 6000 kHz (50 m) + satelito.

Atenton! Ambaŭ elsendoj estas emanigataj ankaŭ per satelito *Eutelsat-II-F-3* en 16 gradoj de orienta latitudo en frekvenco 11.080 GHz, horizontala polarizado, sonportita frekvenco: 8.28 MHz.


Senpagaj ampleksa informilo pri la E-elsendo estas havebla laŭ peto ĉe:

Esperanto-Redakcio
pk 46, PL-00-977 Warszawa, Polio
Fakso: +48-22-444123

Radiostacioj atentu!

Mi kompilas, kaj regule aktualigas la tabelon de E-radioprogramoj en la reto Kompuservo. Bedaŭrinde mi ne ĉiam havas ekzaktajn kaj aktualajn informojn, interalie pro tio, ke ne ĉiu stacio regule anoncas sian frekvencaron kaj la celregionon de la emanigado.

Por akurate informi multajn uzantojn de retaj informoj estas bonvenaj ĉiaj informoj pri E-lingvaj radioelsendoj.



Simon Payne
Am Füllgarten 4,
D-61250 Usingen, Germanio.
Fakso: +49-6081-3955

Radio Box - en Gyula

En radio Box (Gyula, 96 MHz ultrakurtondo) estas ĉiusemajne, vendrede, informoj esperante pri enlanda kaj eksterlanda movado: novaĵoj, aranĝoj laŭ revuoj *Eventoj* kaj *La Gazeto*.

La lokan radioelsendon oni povas aŭdi en urboj Gyula, Békéscsaba Mezöberény, Békés, Sarkad kaj ĝiaj regionoj (ĉirkaŭaĵoj). La e-programo estas aŭskulteblo alterne je la 11-a aŭ 18-a horoj post la novaĵoj.

La programon gvidas, kaj kunlaboron atendas

Georgo Flender dr,
Berényi u. 81.
H-5600 Békéscsaba, Hungario

25 jaroj...

En septembro '94 estis aranĝita en Budapeŝto jubilea ekspozicio (25 jaroj de LF), kio resumis la plej gravajn eventojn de nia kulturo en la lastaj 25 jaroj. Por eventuale uzi aliloke la ilustraĵojn oni devas nepre havi la skriban konsenton de LF-Koop.

1973

* Raymond Schwartz (1894-1973) mortas printempe en Parizo post suferiga malsano. Kune kun Mihály Sárossy (1891-1983) li estas konsiderata la patro de Esperanto-kabareto. Sed Schwartz estis multflanka humoristo: kanzonoj kaj skeĉoj, kalemburoj kaj parodioj, noveloj kaj romanoj, kaj eĉ revuo (*La Pirato*, 1933-36) atestas la grandiozan kontribuon de ĉi tiu unika personeco. Raymond Schwartz estas fenomeno ne konceptebla sen Parizo kaj sen Esperanto. Lia devizo: *Popolo kiu ne kapablas ridi pri si mem, ne estas matura popolo.*

* Monda premiero en Sarajevo de *Doktoro Rosales*, dramo de Giorgio Siffer per la reĝisorado de Emo Marconi. Rolas la teatra stabo de *La Patrolo*, kun Mario Di Gregorio, Enzo Guernieri, Perla Martinelli kaj Gianni Moretto. La verko situas kiel forta novaĵo en la panoramo de la Esperanto-teatro, fakte en momento de stazo, interalie pro la ĵusa malfondo de Internacia Arta Teatro, gvidata de Srdjan Flego (1920-1986) en Parizo.

* *Unuaj libroj por esperantistoj* titoliĝas la unua volumo de serio aperanta en Japanio: per ĝiaj pli ol dudek volumoj Ito Kanzi fariĝos la plej fama zamenhofologo en la mondo. La *Iam kompletigota plena verkaro de Zamenhof* estas la plej impona omaĝo al la aŭtoro de nia lingvo, sed ankaŭ modelo de bibliografia esploro.

(daŭrigota)



Korespondi deziras

Ni estas 11-18 jaraj gimnazianoj, kiuj komencas lerni Esperanton, kaj tre emas ekkorespondi kun eksterlandanoj. Ni ege bonvenigus ankaŭ kuraĝigajn sendaĵojn kaj vizitojn, kiuj helpus nin konvinki niajn gepatrojn kaj direktoron pri vivanteco de Esperanto. Bv. skribi al: *E-grupo de Gimnazio Rymarov, Sokolovská 34, CZ-79501 Rymarov, Ĉeĥio.*

20-jara fraŭlo - pri matematiko, ŝako, komputilado k.a. interesaj temoj tutmonde kun samaĝuloj: *Roberto Zöldy, Erdősor u. 18, H-1046 Budapest, Hungario.*

Ĉina filatelisto volas korespondi kun multaj amikoj en la mondo. *Xin Qiguo, 17 Jiang Jin Zhong Lu, CN-434000 Shashi, Hubei, Ĉinio.*

Mi ŝatus korespondi. *Maria Caroline, 15 j, Rua Guardião 9, Dermat, BR-78600-000 Barra do Garças-MT, Brazilo.*

Grupo de 10 gelernantoj (12 jaroj) dez. korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. *Esperanto-klubo CES, F-49490 Noyant, Francio.*

Anoncetoj

Nekomercaj anoncetoj de abonantoj - inkluzive la rubrikon "Korespondi deziras" - estas senpagaj

Pro tempomankaj kialoj la senatan sekretarian taskon de AIS anstataŭ Petro Chrdle plenumas *Joanna Lewoc, Pf. 1450. D-33044 Paderborn, Germanio.*

Studento pri historio kaj politologio serĉas por diversaj fakaj laboroj malnovajn (ĝis 1955) leterkorespondaĵojn (nacilingvajn aŭ esperantajn) *Cimpa Christian, Budinskyg. 10/16/7, at-1190 Wien, Aŭstrio.*

Ĉu vi konas ŝercojn pri esperantistoj? Sendu ankaŭ Vi primovadajn anekdotojn, ŝercojn al la rubriko "Humuro" de Eventoj. Ankaŭ la aliaj volas rideti...

La redaktoro de *Esperanto sub la Suda Kruco* havas novan adreson: *Donald Broadribb, 59-B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio.* Nova tel.: +61-96-461389. Fakso ne plu disponeblas.

Kiu povas kaj volas helpi la eldonon de la unua E-lernolibro por uzbeklingvanoj kaj de la uzbeka-Esperanta-rusa konversacilibro? Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano.

Faldfolio pri ĝiaj celoj estas senpage havebla de Int. Humanisma kaj Etika Unuiĝo, *IHEU, Oudkerhof 11, NL-3512, GH Utrecht, Nederlando.*

INTERNACIA KONKURSO POR BAZLERNEJANOJ

3-a taskfolio por komencantoj

1. Faru ses substantivojn el la radikoj *por*! (3 poentoj)
 2. Kompletigu per prepozicioj! (3 poentoj)
Maria iras ... kinejo ... ŝia amikino ... aŭtobuso.
 3. Elprenante po unu litero el ĉiuj vortoj vi havos kvin bestojn. Per la elprenitaj literoj faru la sesan! (3 poentoj)
musko / aŝio / pulpo / karto / oblat
 4. Kiuj finaĵoj mankas? (3 poentoj)
La sinjoro donis al la knab... ruĝ... pom... .
 5. Jen tagmanĝo. Kie vi tagmanĝas? Per kio? El kio? (3 poentoj)
 6. *Nordo, sudo, okcidento, oriento.*
Pri kio temas? Kion indikas kompasoj? (2 poentoj)
 7. Kiel ofte aperas la subaj Esperanto-gazetoj? Kiu el ili taŭgas por lernejoj kaj komencantoj? (3 poentoj)
Juna amiko, Eventoj, Monato, Esperanto, El Popola Ĉinio
- La solvojn sendu ĝis la 20-a de decembro al:
Collège Albert Camus, Esperanto-grupo, F-62230 Outreau, Francio

3-A TASKFOLIO POR PROGRESANTOJ

1. Kompletigu la frazojn! (3 poentoj)
La knabino, ... falis, diras, ... la vundo ne doloras.
La libroj, ... vi donacis al mi, estas interesaj.
 2. *Komenco bona - laboro duona.*
Kion oni volas esprimi per la proverbo? (3 poentoj)
 3. Elprenante po unu litero el ĉiuj vortoj vi havos kvin bestojn. Per la elprenitaj literoj faru la sesan beston! (3 poentoj)
musko / aŝio / pulpo / karto / oblat
 4. Ĉu pezi aŭ pesi? (3 poentoj)
Maria pe...as fruktojn per pe...ilo. Oranĝo pe...as 150 gramojn.
 5. Parigu la vortojn (A kun B)! (3 poentoj)
A: *maparo malsanulejo, kreskaĵo, akvujo, kuracilo, vesperiĝo*
B: *planto, atlaso, medikamento, sitelo, krepusko, hospitalo*
 6. *Nordo, sudo, okcidento, oriento.*
Pri kio temas? Kion indikas kompasoj? (2 poentoj)
 7. Kiel ofte aperas la subaj Esperanto-gazetoj? Kiu el ili taŭgas por lernejoj kaj komencantoj? (3 poentoj)
Juna amiko, Eventoj, Monato, Esperanto, El Popola Ĉinio
- La solvojn sendu ĝis la 20-a de decembro al:
Collège Albert Camus, Esperanto-grupo, F-62230 Outreau, Francio



ATENTU!

Abonkotozo por 1995 de EVENTOJ por Hungario estas 1450 Ft, por Slovakio, Rumanio, Kroatio kaj Slovenio estas 29 gld, por Ĉeĥio, Bulgario kaj Polio estas 35 gld, por aliaj landoj surface: 65 gld, aerpoŝte: 76 gld, pagebla al UEA-kodo: ELLS-S. Ne forgesu informi ankaŭ la redakcion pri la renovigo de via abono.

EVENTOJ, Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 282-88-85.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti az MPV-HPI.
Készült a SZELKER Bt. nyomdában:
H-1161 Budapest, Baross u. 114.
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas LINGVO-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.
Reprezo de artikoloj estas permesita, kun indiko de la fontoj.
Abonkotozo: 65 nlg (aere 76 nlg) al la UEA-kodo ell-s.



Multajn gratulojn al
Luigi Fraccaroli
kaj Donatella Feretti
okaze de
ilia geedziĝo
la 31-an de oktobro!